
# *Kubo denuncas persekuton de la usona registaro*




**Kuba diplomato denuncas  ?tatan terorismon  flanke de Usono**

Havano, sep 12 (RHK) La televida reto Telesur citas intervjuon de internacia amaskomunikilaro kun la vicministro pri eksteraj aferoj de Kubo, Carlos Fernández de Cossío, en kiu la diplomato denuncis, ke lia lando estas viktimo de ?tata terorismo, kiun   malmorale, maljuste kaj nelegitime trudas  la usona registaro dum pli ol ses jardekoj por faligi la Revolucion.

Fernández de Cossío memorigis, ke la norda lando tenas la kariban insulon en la listo de landoj, kiuj sponsoras terorismon, kaj la administrado de prezidento Joe Biden da?rigas kun la maljusta pozicio de siaj anta?uloj.

La vicministro emfazis, ke dum usonaj oficistoj malmorale asertas, ke forigi Kubon el la listo estas malfacila el politika vidpunkto, la nacia ekonomio suferas plian doloron ol tiu jam trudita de la blokado de jaroj.

Sekve li klarigis, ke tiuj, kiuj deziras komerci kun la pli Granda el la  Antiloj, povas alfronti sankciojn de Usono, kaj indikis, ke pro tio almena? 30 financaj kaj bankaj institucioj rompis siajn rilatojn kun Kubo.

Telesur elstarigis la vortojn de Fernández de Cossío konstatinte, ke la ekonomio de lia lando povus disvolvi?i, se ?i estas ekskludita el la listo de supozataj nacioj, kiuj subtenas terorismon, kaj emfazis, ke la kuba registaro esperas, ke estos favora politika ?an?o flanke de la Usono..., memorante, ke prezidento Biden, dum sia balotkampanjo, promesis renovigi rilatojn kun la Insulo.

Fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/298951-kubo-denuncas-persekuton-de-la-usona-registaro

**Radio Habana Cuba**